Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭde la 3-an de oktobro 2019 per Skype.

(Protokolo aprobota la 7-an de novembro 2019)

Partoprenis:
Amelie Matt en Tromsø
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Lars Sandbakk en Sandnes
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo
Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 29-an de aŭgusto
Aprobita kun la kompletigo pri kontoinformoj en la tagorda punkto 2. « Ekonomio ... »

2. Ekonomio, niaj bankkontoj kaj disponrajtoj
El la ok kontoj, kiuj estas registritaj por NEL ĉe la banko DNB, tri apartenas al kluboj (Tromsø kaj Stavanger) kaj unu al NJE pro tio, ke ili ne havas propran organiz-numeron ĉe Brønnøysund-registrejo. Pri tiuj kontoj ni ne okupiĝos, ĉar la disponrajtoj estas klaraj kaj apartenas al aliaj organizoj ene de NEL. Krome ni havas konton pri « E-nytt », kiu nuntempe ne estas uzata. Ĝi perdis sian funkcion post kiam la papera eldono de « E-nytt » ĉesis. NEL ne plu bezonos tiun konton. Alia konto apartenas al la norvega ILEI-societo (vidu tagordan punkton 4. sube). Krome NEL havas du kontojn: la ĝeneralan uzkonton, kiun nuntempe disponas Douglas kaj Jardar kaj altinterezan konton, enhavantan 0,- kronon, kies disponrajtoj estas malklaraj. Plej urĝas ordigi disponrajton al nia uzkonto por nia nova kasisto, Claude. Mario iros al la oficejo de DNB en Tromsø por demandi kiel ni povus aranĝi tion. Nun la nova estraro estas registrita ĉe Brønnøysund-registrejo kaj ni jam havas aprobitan estrar-decidon (29/8) pri dispon-rajto de tiu konto.
Krom la kontoj en DNB ni havas konton en banko NORDEA, sed ne estas klare kiu disponas ĝin. Se ni ne havas monon tie, tiam ni ne bezonas okupiĝi pri ĝi.
Pri niaj kontoj ĉe Skagen-fondaĵo ni devos kontakti la fondaĵon. Eble nur Anne Karin havis aliron, disponrajton pri tiuj kontoj. Mario esploros la aferon.

3. Postlasitaj libroj, dokumentoj de Anne Karin
Nun ĉiuj libroj, kajeroj kiujn ni ricevis de la parencoj de Anne Karin (ĉ. 40 kilogramoj) troviĝas en la domo de Lars. Temas pri libroj en tre diversaj temoj : lernolibroj , vortaroj, romanoj, poemaroj, libroj pri spiritismo ktp., kelkaj en pluraj ekzempleroj. Kiam estos ebleco Lars aŭ iu alia klubano transportu la librojn kiujn oni mem ne bezonas en la klubo Stavanger/Bryne al nia biblioteko/oficejo en Oslo. Tie Douglas povos elekti tiujn kiujn ni devus konservi, la aliajn ni povus forsendi, ekzemple al Afriko.

4. ILEI en Norvegio
Anne Karin estis la kontaktpersono de ILEI en Norvegio kaj la mastrumanto de la ILEI-konto, registrita ĉe DNB por NEL. Kvankam la norvega grupo de ILEI ne estis aktiva dum la lastaj jaroj, tamen la retejo de ILEI raportas pri 10 abonoj kaj 6 abonantoj de Internacia Pedagogia Revuo el Norvegio en 2017. Ni devus eltrovi, kiuj estas tiuj abonantoj kaj ĉu iu el ili volus esti kontaktpersono de ILEI en Norvegio kaj ĉu oni bezonas apartan bankkonton kiu ĝis nun ĉefe servis nur la peradon de abonoj de IPR ?

5. Studorganizo
La studorganizo *Næring og Samfunn*, kie NEL membras tamen ne estas malfondata, kio estis la minaco pro nesufiĉo da studhoroj. Nun oni eĉ anoncis, ke nova kaj pli facila procezo por registrado de kursoj estos prilaborata. Ni ĝojas, ke ni ne devas serĉi novan studorganizon kaj ni povas daŭrigi nian membrecon en tiu ĉi organizo kaj pluuzi nian nunan studplanon : "Esperanto konversasjon". Ni devas instigi plurajn klubojn registri siajn kursojn, kunvenojn ĉe la studorganizo por montri nian apogon al la studorganizo kaj ricevi iom da mono de ili.

6. Skandinava kongreso 2021
Estis plano pri tio, ke DEA, gvidata de Peter Wraae organizos la venontan (trian) Skandinavian Kongreson en 2021. Tiun jaron ankaŭ NEL planas aranĝi sian landan kunvenon en Oslo. Mario kontaktos la gvidantojn de DEA kaj SEF kaj esploros ĉu ni povus organizi nian landan kunvenon dum tiu skandinavia kongreso kiel la svedoj kaj danoj faris lastfoje.

7. Eventualaĵoj
Lars raportis, ke li ankoraŭ daŭre laboras pri la nekrologo memore de Anne Karin por Norvega Esperantisto. Indus ankaŭ sendi mallongigitan version de la nekrologo al revuo Esperanto, ĉar Anne Karin kiel partoprenanto de la plej multaj Universalaj Kongresoj, estis bone konata ankaŭ en la internacia movado.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 21:50
La venonta interkonsiliĝo okazos la 7-an de novembro 2019 je la 20.30.

Raportis Mario Machlik